

Kulturaj Kajeroj

É.MAHÉ →

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, 44 - NANTES, Francujo

JARABONO :

Simpla : 10 fkoj
Bonfara : 15 fkoj

P. BABIN
13, boulevard de la Chauvinière
44 - Nantes
P.Ĉ.K Nantes : 2.813.61

(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

MARTO - APRILO

1973 2

KULTURAJ KAJEROJ

1973 MARTO - APRILO

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

Jean-Paul Guillot, 21, rue des Aubépines
86 - Poitiers

Komitatanoj :

Pierre Babin
Pierre Chevalier
Simone Guillot

La represo de artikolo el nia revuo estas permesita post interkonsento, kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represaĵo.

ENHAVO

El Grésillon	
Legendo pri Gresillon	J.-G. Fowler
Esperanto tra la mondo	A. Frangeul
Boacoj	esperantigis M. Turin
Megalitaj monumentoj	
Molière	B. Cheverry
Karnovoraj Plantoj	
Hunda mondo	L. Tihanyi
La vagado dum la kursotempo	trad. C. Bourdelon
Kiam la mezepokuloj libertempis	
Nia konkurso	P. Chevalier

KULTURAJ KAJEROJ
ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ
spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ
publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ
respondos al gramatikaj demandoj.

KULTURAJ KAJEROJ
prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzaĵojn.

Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu al vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn

El Grésillon

Ĉu vi aliĝis al unu el niaj periodoj ? Multaj jam sendis sian aliĝilon kaj la ankoraŭ liberaj litoj estas malmutaj por la unua kaj la dua periodoj, ĉefe dum la tuta monato Julio. Tiuj, kiuj preferas viziti Gresillon dum Aŭgusto pli facile trovos la deziratan loĝejon sed verŝajne ne longtempe ĉar ĉiutage alvenas informpetoj ankaŭ por tiu tria periodo. Dum la kvara periodo vi trovos ne nur kursojn kaj eblecon konversacii sed ankaŭ, se vi preferas, ripozon. Mi memorigas al la interesatoj, ke dum la dua periodo okazos ĉefe prelegoj diverstemaj kaj ekskursoj, kaj dum la unua, la tria kaj la kvara kursoj diversnivelaj gvidataj de Fino Le Magadure, kaj Sroj P. kaj D. Babin, J. Benistant, F. Le Magadure, A. Ribot.

La kultura programo multe similas tiujn de la antaŭaj jaroj. Kion novan trovos do la vizitantoj ? Sur la dua etaĝo ĉambroj estis modernigitaj ; kvar du — aŭ tri — litaj ĉambroj estis faritaj el pli grandaj ĉar ofte mankas tiaj ĉambroj. Pli da lavokonkoj nun ricevas varman akvon. Pliaj sanitaraj instalaĵoj estis konstruitaj sur la unua kaj dua etaĝoj. Ni esperas (nur esperas ĉar la entreprenistoj ne ĉiam estas akurataj), ke la unua parto de konstruado de la prelegsalono estos farita komence de julio, financita de la Kultura Asocio, kiu ricevis multajn mondonacojn de geamikoj tiucele.

Eĉ la parko ŝanĝiĝis sed tute ne laŭ nia volo. Najbara tereno estis aĉetita de iu Baugéano, kiu fosigis tie lageton. Ĉar la laboro estis farita dum la vintro la pejzaĝo ankoraŭ iom suferas de tiu transformiĝo sed, somere, ĝi certe estos bela.

Ni atendas viajn aliĝojn. Ni esperas, ke vi skribos sufiĉe frue, por ke ni ne estu devigataj respondi al vi, ke loĝeblecoj ne plu ekzistas.

Legendo pri Gresillon

Ĉu vi konas la kastelon ?
Ĝi meritas grandan famon :
Oni spitas la Babelon,
Kaj defias la malamon.

Jam antaŭ multaj jaroj
Regis la markiz' servutojn,
Kaj per senkompataj agoj,
Traktis ilin kiel brutojn.

La praleĝojn li apogis
Helpe de la vip' de vokto.
Ĉefe li al si arogis
Rajton de unua nokto.

Tamen ies novedzino
Per amora elokvento
Lin kondukis ĉe la fino
Ege, ĉarme al la pento.

Unu nokto ne sufiĉis,
Ne sufiĉis eĉ la dua :
Tutan vivon ŝi dediĉis
Al la gaja task' instrua.

Kromvirin ! Sed ŝi emfazis
Ke ŝi faras verk' de Dio.
(Kio pri la edz' okazis
Kuŝas preter mia scio).

Ŝi atingis emeriton
Pro la aĝo kaj malbelo,
Sed ŝi lasis la spiriton
Ŝvebe en la amkastelo.

Tie regos ĉiam amo,
Kiel dum la belaj tagoj
Kiam nutris ŝi per pano
La anasojn de la lago.

J.-G. FOWLER.

Esperanto tra la Mondo

PRI LA UNIVERSALA KONGRESO

— Kiel ĉefa temo de la 58a Universala Kongreso, la estraro de U.E.A. elektis : « Lingva egalrajteco en teorio kaj praktiko ». Por la populara kongresa programero « Debato » estas elektita : « Ĉu Esperanto povas sukcesi sen lokaj grupoj ? ».

— Por la oratora konkurso de la gejunuloj, la temoj estos : 1. Kion celas la hodiaŭa junularo ? 2 .Ĉu povas ekzisti internacia kulturo ? 3. Lingvoj kiel portantoj de kulturaj valoroj. 4. La studentaro kaj la ĝenerala publiko.

— La esperanto Societo en Ljubljana organizos 3-tagan programon de la 24a ĝis la 27a de Julio, kiel antaŭkongreso.

— La postkongresa komitato en Ateno (Grekujo) preparas riĉan kultura-turisman programon por la postkongreso.

ALIAJ MANIFESTACIOJ

— Internacia renkontiĝo Naturamika, 18-27a de Julio, en Abaliget (Hungario). Adreso : Organiza Komitato de I.R.E.N., H-7601 Pécs, Pf. 2, Hungario.

— Internacaj esperanto-kursoj, en Pamporovo kaj Pisanica (Bulgario), dum Julio kaj Aŭgusto. Adreso : Distrika Esperanto-Komitato, Smoljan, Bulgario.

— Esperantista ŝak-festivalo, organizita de Esperantista Ŝak-Ligo Internacia. Adreso : L. Fiala, Fugnerova 28/18, CS-29001 Podelrady, Ĉekoslovakio.

— « Ora pola aŭtuno », 16-29a de Septembro, en Miedzygorze (Pollando). Adreso : Pola Esperanto-Asocio, P.K. 16, PL 50-952 Wroclaw 17.

— Esperanto-renkontoj en la kadro de la Monda Festivalo de la Junularo kaj Studentoj, 28a de Julio, — 5a de Aŭgusto, en Berlino (D.D.R.).

LINGVISTAJ KONFERENCOJ

Oni povas veršajne taksi kiel gravajn por nia movado, la du lingvistajn konferencojn kiuj okazis, en Moskvo, en Oktobro 1972 kaj en Nov-Jorko, fine de Decembro.

En Moskvo, sub aŭspicio de Lingvoscienca Instituto de la Sc'enca Akademio de Soveta Unio, dum 4 tagoj, sciencistoj-lingvistoj, studis la diversajn aspektojn de la interlingvistiko kaj de Esperanto.

En Nov-Jorko, en la kadro de la ĉiujara kunveno de Modern Language Association, okazis kiel parto de la programo, seminario sub la titolo : « Esperantaj lingvo kaj literaturo : Interlingvistiko », kun 50 ĉeestantoj.

500a NASKIĜDATREVENO DE NIKOLAO KOPERNIK

Ĉiuj infanoj de la mondo malpli ol ses jaraj estas invititaj partopreni la solenadon de la 500a naskiĝdatreveno de Nikolao Kopernik per verkado de desegnaĵoj, pentraĵoj, surgluaĵoj, miniaturoj, belskribaĵoj, ktp... pri la pola astronomo. Premioj estos senditaj, kaj la 500 plej interesaj estos montrataj okaze de multnombraj ekspozicioj. Sendu viajn kreitaĵojn antaŭ la 1a de Marto aŭ antaŭ la 1a de Julio al S-ano I. Flaczynski, Esperanto-Klubo, Amicale laïque, école Elby, rue Mitry, 62150 Houdain (Francujo).

AUTOMOBILISTA KLUBO

S-ro G. Grattapaglia, respondulo por tiu fako, informas ke li nun havas en sia adresaro pli ol 500 membrojn el 25 landoj. En Francujo, 23 personoj aliĝis antaŭ 1968, kiuj nun devus realiĝi, pagante 6 F. Poste aliĝis 91 personoj, kiuj laŭ decido farita dum la kongreso en Helsinki, estas Dumvivaj Membroj.

S-ro Grattapaglia opinias ke, se ni povus esti pluraj miloj en la klubo, li povus ricevi subvenciojn de grandaj firmaoj kaj petrolkompanioj.

Antaŭ tiu brila espero, ni petas helpon de ĉiuj samideanoj-aŭtomobilistoj. Ni propagandu, ni varbu ! Memoru, ke la dumviva kotizo estas nur 6 F. Sendu ĝin al J. Guillaume (p. ĉ. konto 18.999 Paris) kiu sendos al vi la modernan insignon de la klubo. Kiuj deziras plian ekzempleron aldonu 2 F. (plus sendkostojn).

PARLAMENTA GRUPO EN BRITUJO

Lastatempe estis fondita en Britujo, grupo de parlamentanoj por Esperanto. La celo de la grupo estas atentigi la parlamenton pri Esperanto, ĉefe per demandoj en la parlamentejo al la registaro, kaj persvadi la registaron antaŭenigi la instruadon de la internacia lingvo en la lernejoj.

UNIVERSITATAJ KURSOJ

— La grava filio de la Universitato de Kalifornio en San Diego enkondukis oficialan kurson « enkonduko al Esperanto ». La kurso inkluzivas instruadon en la lingva laboratorio.

— Ankaŭ tiun jaron, okazas oficiala kurso de Esperanto en la beletra fakultato de Clermont-Ferrand. La Universitato kreis specialan ekzamenon konsistantan el tri gradoj.

— En Meddelin (Kolombio), kursoj pri la internacia lingvo, estis malfermitaj en du universitatoj.

— Okazis intenca ĉiuvespera kurso pri la internacia lingvo dum 50 tagoj, en la Universitato Guk-Je, en Seulo (Suda Koreujo).

— En la Universitato de Vieno okazas scienca kurso pri interlingvistiko.

— En Sovet-Unio, kurso pri Esperanto okazas almenaŭ en 7 universitatoj kaj 21 institutoj.

MONDA TURISMO

Aperis, stencilita, la unua numero de la bulteno « Turismo per Esperanto » de la asocio « Monda Turismo » Adreso de tiu asocio : « Monda Turismo », P.K. 45, Sofia-C, Bulgario.

NOVAJ ELDONAĴOJ

— Reeldonitaj : la tri romanoj de Stellan Engholm : « Al Torento », « Infanoj en torento », « Junuloj en Torento ».

— « Okupacio », de Ermi Krusten, tradukita el la estona lingvo de Hillar Saha.

—« Kit vivas » de Jytte Lyngbrik, tradukita el la dana de Gudrun Riisberg. Rakonto pri modernaj gejunuloj.

EN RUMANUJO

Sekve de pli favora registara sintenado, ŝtata komisiono ellaboras statuton por Rumana Esperanto-Asocio.

EN SUD-VJETNAMIO

Tri kursoj de Esperanto malfermiĝis en la sud-vjetnamia ĉefurbo. La loka grupo nun disponas ankaŭ pri koresponda kurso.

LA SCIENCA TRADUKSERVO

Se vi povas oferi iom da tempo por traduki nacilingvajn sciencajn artikolojn, aŭ informi sciencajn centrojn pri la ekzisto de la esperanto-scienca tradukservo, rilatu kun la respondeculo : S-ro André Heck, rue du Chera 49, B-4000 Liège, Belgujo.

BOACOJ

Norde de la Polusa Cirklo 30.000 Laponoj vivas sur la solecaj vastejoj de Finnlando, Norvegio kaj Svedio. Malpli ol 5.000 inter ili tiras el la boacaroj siajn tutajn vivrimedojn ; ili akompanas la boacojn dum la sezona migrado.

Franco, Pierre Marc, faris sian unuan vojaĝon en Laponio dum 1957, kaj poste faris aliajn, finfine li sukcesis ke lapona familio adoptis lin dum pluraj monatoj. Tiel li spertis la tutan laponan vivadon, akompanante la brutaron dum la printempa migrado al norda ĉemara parto de la lando. Revenante al Francio, li faris konferencon kaj montris filmon pri tiu viv-maniero.

Jen kiel li rakontas sian aventuron : Mi alvenis al miaj laponaj amikoj post la longa vintro komence de marto ; jam oni vidis la sunlumon sed frostis ĝis — 40°. Miaj geamikoj vivis en la lignaj dometoj de la vintra sezono. Miaj amikoj unue faris por mi vestaĵojn el boac-pelto same kiel la siaj. Mi alkutimiĝis manĝi kiel ili boacaĵon kaj trinki salitan kafon. Iom post iom mi lernis ilian lingvon. Mi eklernis ankaŭ prizorgi la boacaron, kiu estis je kelkaj kilometroj de la kabanoj sur la tundro. Mi rigardis miajn amikojn kapti per lazo junajn boacojn por marki ilin sur la oreloj per ponardo, ĉar ĉiu posedanto de brutaro havas specialan markon konitan de la landa policaro.

Meze de aprilo la bestoj fariĝas nervaj. Epoko venis por foriri al pli nordaj regionoj. La virinoj kaj infanoj foriras per motoraj veturiloj al la bordo de la arkta maro. La viroj kaj junuloj akompanas la bestojn dum la tuta vojaĝo (200 kilometrojn longa). Tiu migrado estas necesa, ĉar somere la tundro ne plu taŭgas, ĝi fariĝas senfinaj marĉoj, kie la kuloj kaj muŝoj multegaj povas mortigi la boacojn plenigante iliajn nazojn. Cetere ili ne plu trovas likenon, ĉar ĝi kreskas nur sub neĝo. Male insuloj de la arkta maro estas bonaj paŝtejoj por la boacoj kiuj povas vivi tie ĝis la aŭtuno.

La vojaĝo estas terura elprovado por homoj kaj bestoj. Kelkfoje degelado okazas subite, kaj la bestoj malfacile iras : keikaj restas malantaŭe senfortaj kaj estas perditaj. Antaŭ ol trairi la lastajn marbordajn montojn sen likeno, oni faras grandan paŭzon por ripozi kaj multe manĝi. Kelkfoje la nebulo igas pli danĝera tiun iradon tra la montoj. Kiam oni atingas la marbordon, la vojaĝo ne estas finita, ĉar sur insulo malproksima je 3 kilometroj la paŝtejo estas la plej bona. La boacoj devas transnaĝi tiun markolon. Oni kolektas la tutan boacaron en parkejo, atendante la plej taŭgan momenton por transiri la maron, tio estas la altan tajdon. Tiam oni elektas malnovan virboacon al kies kolo oni ligas sonorileton, oni enŝipigas ĝin sur barkon kaj tiel transiras al la insulo. Sekvante la sonon, ĉiuj bestoj naĝas malantaŭe. Tio estas alia terura elprovado por la bestoj ; kelkaj ne havas sufiĉe da fortoj kaj mortas. Sur la marbordo de la insulo la virinoj kaj infanoj jam alvenis, pretigis la kampadejon kaj helpas la plej junajn bestojn je la alveno.


Por ĉiuj dum 80 tagoj komencas libera senzorga vivado ĉar la maro donas abunde fiŝojn kaj birdojn. Tiuj homoj sin nomas « Same » nomo kiu signifas « la realaj homoj ».

Ĉi-vintre (dum vintro 1972-1973) Pierre Marc provas novan sperton : li venigis al sia monta regiono de Francujo « Jura » boacojn kaj Laponojn. Proksimume 12 boacojn 6 glitveturilojn kaj diversajn laponajn objektojn alportis aviadile du Laponoj ĝis la urbo « Lyon » (Liono). En la monta regiono apud vilaĝeto oni starigis parkejon por la bestoj en valo, de nun nomata « la valo de la boacoj ». Oni jungis kelkajn boacojn al glitveturiloj kaj promenigas turistojn. La diversajn laponajn objektojn alportitajn el Laponio oni kolektis en muzeo kaj tiu ekspozicio multe allogas turistojn.

Sed la celo de Pierre Marc ne estas nur turista. Li deziras pruvi ke sur monta regiono en Francio povas vivi boacoj. Jam en Skotlando simila spertado okazis, kaj nun boacaro prosperas tie same kiel en Laponio.


Tiu sperto havas la apogon de ĉiuj, kiuj protektas la naturon.

esperantiĝis Marcelle Turin
(laŭ artikolo kaj libro de Pierre Marc
kaj artikolo de regiona franca gazeto)



MEGALITAJ MONUMENTOJ

Longtempe oni atribuis la megalitajn monumentojn al Keltoj kaj pli precize al Druidoj. Sed tiajn monumentojn oni malkovris en Krimeo, Indujo, Nord-Afriko, ĝis Japanujo kaj Peruo.



Ĉu la monumentoj en Karnako (linioj kaj Rondoj de Ŝtonoj) estas ia astronomia komputero starigita antaŭ dekoj da miljaroj ?

Alexander Thom, eksa Profesoro en Oxford-Universitato pri teknologio, dediĉis multajn jarojn de sia vivo al studo de ĉirkaŭ 400 megalitaj monumentoj, inter kiuj la plej fama estas la Granda Rondo de Ŝtonoj en Stonhenge (Britujo). Profesoro Thom konkludis, ke la konstruantoj de tiuj monumentoj (menhiroj, dolmenoj, linioj aŭ rondoj de ŝtonoj) posedis matematikajn kaj astronomiajn sciojn, kiuj estis la plej evoluintaj.

IAJ GIGANTAJ ANGULMEZURILOJ

Kio devus intrigi tiujn tiamajn homojn estas la ŝanĝiĝoj, kiuj rapide okazas (de unu nokto al la alia) ĉe la punktoj de la leviĝo kaj kuŝiĝo de la Luno. En la Insuloj Hebridoj — kie estas multaj megalitaj monumentoj — povas okazi, ke la lunleviĝo kaj la lun-kuŝiĝo efektiviĝas preskaŭ ĉe Nordo ; 2 semajnojn pli poste la Luno aperas, nur dum kelkaj horoj ĉe plen-Sudo. Tiu sintenado de Luno, ŝajne neracia, estas ŝuldita al varioj ĉe deklinacio de nia satelito : varioj de ĝia latitudo sur nia ĉiela sfero.

Tiuj varioj rezultas (vidate de la Tero) de la kombinado de 3 ciklaj movoj de Luno. La unua movo daŭras 27,21 tagojn (estas la luna monato) ; la dua daŭras 173,3 tagojn ; la tria, multe pli longa, daŭras 18,61 jarojn. La konkludo estas, ke la deklinacio de Luno atingas maksimumajn kaj minimumajn absolutajn valorojn nur ĉiun 18-an jaron.

Nu, ŝajnas, ke la megalita Homo projektis registri tiujn ekstremajn poziciojn pere de Ŝtonoj. Multaj ŝton-monumentoj ŝajnas esti gigantaj angulmezuriloj, kiuj markas la direkton kaj pozicion de gravaj ĉielaj manifestiĝoj.

Konstruante du gvidomarkojn, sufiĉe malproksimajn unu de la alia, oni povas materiigi cellinion direkte al la punkto, kiu, sur la horizonto, respondas al aparta deklinacio de Luno.

TITANA GRAFIKAĴO

Kio estas rimarkinda estas, ke, por instali tian observatorion, la tiamaj homoj bezonus kelkajn dekojn da jarojn, eĉ jarcentojn ! (pro la malofteco de ekstremaj pozicioj de Luno, ĉiun 18-an jaron).

Sed ŝajnas, ke la megalitoj-konstruantoj ne atendis la maloftajn observadojn de tiuj Lunopozicioj : ili ilin kalkulis !

Hodiaŭ, por efektivigi tiajn kalkulojn la sciencistoj uzas komputerojn !

Kiamaniere kalkulis la prahistoriaj homoj ? La respondo eble troviĝas en Karnako. En Eŭropo estas 2 grandaj ŝton-linioj : En Caithness (nordokcidente de Skotlando) kaj en Karnako (Bretonio de Francujo). Laŭ Profesoro Thom, tiuj linioj estus komputeroj uzataj por solvi la problemojn, kiuj rezultis de la observadoj de Luno.

Oni povas observi Lunon nur sur la horizonto kaj nur dum nokto. La maksimuma pozicio povas esti atingita dum diurno kaj pro tio ĝi estas nevidebla ; ĉar Luno rapide translokiĝas, la noktaj observadoj povas enteni eraron, egalan, je, proksimume, arko 10 minuta.

Nu, ŝajnas, ke la prahistoria ulo, kapabla alliniigi siajn ŝtonojn kun pli granda precizeco, deziris nuligi tiun mezur-eraron.

Nuntempe, por solvi la problemon, oni observas dum kelkaj noktoj la deklinacion de Luno antaŭ kaj post ĝia maksimumo kaj poste oni algebre ekstrapolas por trovi la maksimuman punkton. Ŝajne, estas tio, kion faris la homoj de la megalitoj. Sed ili uzis enorman grafikaĵon, kiu estas nenio alia ol la linioj de Karnako.

Profesoro Thom klopodas retrovi la ekzaktan matematikan signifon de tiuj linioj. Nune oni pensas, ke ili estas la ŝlosilo de la problemo. Fakte tiuj linioj estas proksimaj de la « Granda Rompita Menhiro », la plej granda en Eŭropo, kiu troviĝas sur duoninsulo en Golfo de Quiberon. Tiu enorma monumento, hodiaŭ renversita kaj rompita en 4 pecojn, estis 21 m - alta kaj pezis 340 tunojn. Kiamaniere oni ĝin starigis estas mistero !

Certa estas la fakto, ke ĝi estas ĉirkaŭita, laŭ diversaj distancoj, de aliaj monumentoj, kies pozicion Profesoro Thom klopodis noti kun plej granda precizeco. Li konstatis, ke almenaŭ 8 lunaj linioj estas ankoraŭ videblaj, ke 8 cellinioj estas materiigitaj per ŝtonoj situantaj antaŭ kaj malantaŭ la Granda Menhiro ĝis distanco 15-kilometra ; eĉ kelkaj ŝtonoj estas sur alia flanko de la golfo.

Estus neeble konstrui tian ensemblon sen perfekte ellaborita metodo pri astronomia kalkulo !

KIU ESTIS LA CELO

Tiuj homoj, kiuj disponis nur roko-pecojn, sukcesis determini kaj montri anomaliojn en la movo de Luno (nur en nia moderna tempo, oni remalkovris tiujn anomaliojn). La regulado de iliaj sciencaj teknikoj certe postulis kelkajn centojn da jaroj. Tio signifas, ke tiuj homoj estis multe pli inteligentaj ol oni, ĝis nun, supozis kaj ke ilia societo restis stabila dum tiu tuta tempo.

Sed la demando restas : Kial la neolitikaj homoj konstruis tiujn enormajn astronomiajn monumentojn ? ĉu por antaŭvidi la momenton de la dangeraj tajdoj ? ĉu por antaŭdiri la eklipsojn ?

La enormeco de la monumentoj en Stonhenge kaj Karnako sugestas celon multe pli profundan, multe pli grandiozan, multe pli misteran !

STONHENGE

1500 jarojn antaŭ Kristo homoj konstruis en Stonhenge enorman rondon de ŝtonoj, kies diametro estas 30 metroj ; ĉiu el la 30 ŝtonfostoj pezas 25 tunojn kaj subportas seninterrompan ringon el 30 linteloj. Meze de la cirklo estas ankoraŭ « trilito » (trilito estas lintelo lokita sur du pilieroj), konstituita el 2 ŝtonfostoj (ĉiu pezas 45 tunojn) kaj kolosa lintelo.

La plej grandaj el la menhiroj kaj dolmenoj montras mirindaĵojn de mekaniko. Se la plejmulto el tiuj blokoj estis prenitaj sur la regiona grundo, tamen oni devis ilin eltiri, ilin treni, ilin levi, ilin starigi, ilin loki, ilin fiksi. Kelkaj pezas 250 000 kilogramojn, eĉ pli. Kelkaj el tiuj ŝtonoj (kaj inter la plej pezaj el la megalitoj de Stonhenge) estis transportitaj laŭ 250 kilometroj. Krom la brakoj, kiujn oni supozas estintaj ĉi tie, estis necesaj levieroj, rulcilindroj, vinĉoj, ŝnuregoj, kies ludo, potenco de streĉiĝo kaj solideco estis zorge kalkulitaj. Vere tio postulis inĝenierojn !

Kelkaj ŝtonoj en Stonhenge estas ankoraŭ nedifektitaj. Ili montras rimarkindan teknikon de tajlado, kiun kelkaj sciuloj parencigis kun tiu de la Egiptoj. La linteloj estas fiksitaj sur la pilieroj per tenonoj ; unu el ili estas videbla sur la dekstra piliero (de la bildo). Tiu konstruo ne povas esti ellaborado de la Barbaroj.

Sur la trilitoj de Stonhenge oni malkovris (en 1953, dank'al tanĝa lumo) gravuraĵojn el Kreta stilo : ponardo, samstila kiel tiuj uzataj en la Micena Grekujo, 1500 jarojn antaŭ Kristo.

Tio montras, ke la Kretanoj venis en Anglujon almenaŭ 2 000 jarojn antaŭ Kristo. Cetere, la irlanda legendo raportas pri invado de Irlando fare de la Milet-anoj, kiuj agade partoprenis estradon de la Insulo.

MOLIÈRE 1622 - 1673

Datoj ĉi-supraj enkondukas kalkulon, kies rezulto montras evidentaĵon : 1973, tricentjara datreveno pri morto de la plej famkonata franca dramisto kaj komika verkisto de la 17-a jarcento.

Certe, tion vi jam legis, aŭ legos, en diversaj tutmondaj gazetoj kaj revuoj, esperantistaj aŭ ne.

Tamen, ŝajnas, ke pli ol aliaj, esperantistoj ne povas ne interesiĝi al verkisto tiel humaneca, kiel Moliere.

Tion jam opiniis la pioniroj kaj majstroj de nia movado, kaj precize, hodiaŭ, ni volas eltiri plejparton de tiu artikolo el esperantistaj fontoj ; ordigante ilin ne laŭ deven-datoj, nur laŭ ŝajna logika plano.

Por bone prezenti Moliere, ni reprenu la enkondukon al « La Mokindaj Preciozulinoj » komedio tradukita el la franca lingvo de André Ribot. Jen lia prezentado : « Vivo de Moliere ». Oni povas difini tri partojn en la vivo de Moliere :

1. — **LA JUNAĜO :**

Jean-Baptiste Poquelin (Poklen) naskiĝis en la jaro 1622 en Parizo, kie la patro laboris kiel drapiristo kaj ĉambristo de la reĝo ; malgraŭ la patra deziro, ke la filo praktiku la saman metion, Jean-Baptiste ricevis tre ŝatindan instruon ; li fariĝis unue lernanto de la fama Kolegio de Clermont (Klermon) en kiu li konatiĝis kun la idaro de la plej altrangaj eminentuloj : Chapelle (Sapel), Bernier (Bernje) Princo de Conti (Konti), k.t.p. Li aŭskultis la lekciojn de la epikura filozofo Gassendi kaj sub la gvidado de famaj profesoroj li lernis kiel legi kaj kompreni la latinajn verkistojn. Laŭŝajne, ĉio pretigis lin por la jura kariero, sed estiĝis en li nerezistebla inklino al teatra vivo, ĉar lia avo kunprenis lin ofte al prezentadoj de la tiutempa teatro « Hotel de Bourgogne » (otel d Burgonj).

2. — **LA JAROJ DE PLIBONIĈO :**

En 1653, li forlasis la patran profesion kaj iĝis teatristo ; sekvinte la instruon de la itala burleskulo- Scaramuccia (Sharamuk-ĉia) li fondis, kun la familio Béjart (Beĵar) la « faman teatron », kies aktoroj sensukcese ludis en kelkaj parizaj teatroj. Pro sensacia malsukceso en 1646, la trupo vojaĝis en la provincoj.

La repertuaro de Moliere enhavis laŭmodajn komediojn kaj tragediojn de Corneille (Kornej), Rotrou (rotru) k.t.p. kaj multajn farsojn inspiritajn de la italoj kaj de la popolaj tradicioj.

3. — **LA JAROJ DE VERKADO :**

Post 12 jaroj da vojaĝado tra la francaj provincoj, Moliere kun siaj geaktoroj revenis Parizon kaj akiris la reĝan favoron. La frato de la reĝo enoficigis lin kiel estron de lia trupo kaj disponigis al li la Cambregon de « Petit Bourbon » kaj poste « Palais Royal ». Atinginte la gloron, Moliere edziĝis al unu el siaj aktorinoj, Armande Béjart (1622) kaj sin dediĉis plene al sia laboro de trupestro, komedia kaj tragedia aktoro kaj aŭtoro, ĝis la tago, kiam li preskaŭ mortis sur la scenejo, ludante en la « Malsanulo pro imago » (1673).


Ĉar en tiu epoko la katolika eklezio ekskomunikis la teatristojn, lia vidvino devis peti de la reĝo mem la permeson por religia enterigo.

El tiu vivo ni precipe memoru, ke la reĝa protektado neniam mankis al Moliere : sekve, li povis senpune ridindigi kelkajn etnobelojn kaj la religiajn hipokritulojn.

El la Moljer-verkoj, ĉu multaj estis tradukitaj en Esperanton, tiel donante la eblecon al studentoj tutmondaj trovi en Esperanto-tradukoj helpon al studado kaj al kono de la spirito de la Franca literaturo de la 17-a jarcento ?

Nun, ni lasu la parolon al S-ro Fowler el Londono, kiu, helpe de la riĉ-enhava London-kluba biblioteko, funde studis la temon.

Tute nature, li komencas per traduko de L.-L. Zamhenof mem, kiu bone konis la francan lingvon. El ĝi, nia majstro tradukis « Georgo Dandin ». Ĉi-tiu estas la sola tuta verko franca, kiun li tradukis ; verko en nia periodo multe pli alte taksata de nuntempaj beletristoj, ol de tiuj de la tempo (1908), kiam li tradukis ĝin. Eble, ĉi-tiu komedio aparte plaĉis al D-ro Zamenhof pro la kompato, kiun sentema homo devas sperti por ĉefpersono trompata kaj persekutata de ĉiu alia persono de la dramo.



Krom « Georgo Dandin », inter la aliaj prozaj dramoj de Moliere, estis tradukoj de « Don Juan » fare de D-ro Boirac.

« La Avarulo » -n (l'Avare) tradukis Sam Meyer. (Dufoje eldonita en la « Kolekto Aprobita ») « La Edziĝo Kontraŭvola » (Le Mariage Forcé). Komedio-baleto, malpli konata verko de Moliere, estis tradukita de Victor Dufeutreuil en 1905.

« La Nobela Burĝo » -n (Le Bourgeois Gentilhomme) tradukis Richard Levin en 1936. Grava verko, bele presita, kun ilustraĵoj kaj notoj. Vere modela eldonaĵo. « La Mokindaj Preciozulinoj » -n (Les Précieuses Ridicules) tradukis André Ribot, (Roger Bernard, en sia traduko de la « Naŭzo » de Sartre, mencias ĉi-tiun verkon, kiel fonton de la neologismo « precioza »).

El la versaj komedioj de Moliere esperantigitaj :

« Amfitriono » (Amphytrion) estis tradukita en 1922. (Fakte, kvankam oni eldonis ĝin en 1922, ĝi estis verkita plej parte, frue en la jarcento) E. Legrand elektis tradukiala aleksandrajn versojn per senrimaj kvinjamboj. En sia enkonduko, li pardonpetas pro la « malmoralaĵoj » de la finaj scenoj de la unua akto ! Laŭ ni la stilo estas « malmoderna », eĉ ne tre kontentiga kiel traduko.

« La Mizantropo » -n (Le Misanthrope) tradukis H. Boucon en 1930. Ĉi-tiu, laŭ kompetentuloj, estas la ĉefverko de Moliere. La traduko, malfeliĉe, ne redonas la senton de la originalo. Anstataŭ la fleksebleco de la aleksandraj versoj, Boucon donas senrimajn kvaramfibrakojn (ekz : Pro Dio ! Ne estu ni tiel ĉagrenaj !)... rigida kaj tro emfaza metriko.

Tiaj kritikoj, bonaj aŭ malpli bonaj, tamen devas doni al vi emon al rekonatiĝo kun la verkaro de Moliere.

Sciu, ke neniu pli ol li riĉigis la francan lingvon, la beletran kaj la vulgaran, de tiom da trafaj versoj, vortoj, diraĵoj, ke multaj el ili iĝis proverboj ; kaj tiel talente kaj funde, li elĉerpis la tutan sukon de sia arto, en la plej burleskaj farsoj ĝis komedioj plej noblaj, ke multaj herooj de li kreitaj restas tipaj kaj konstante revivantaj ĉirkaŭ ni, sub Molier- baptonomoj.

Por fini, mi volas citi vidpunkton de nuntempa franca verkisto, F. Mauriac : « Moliere la Tragika. Moliere estas trista, multe pli trista ol Pascal... Pli sola en la amo, ol iu ajn homo iam estis... Nia plej fama « komika » verkisto, iun tagon, konfidis al sia amiko ŝapel (Chapelle) : « Se, kiel mi, vi klopodus plezurigi kaj distri la reĝon, se vi portus la ŝarĝon nutri kaj gvidi kvindekon da personoj, vivigi teatron, verki por subteni vian reputacion, kredu min, certe, vi ne emus al rido ! ».

Fakte, se Moliere ne povis senti sin gajema, tamen, li konstante sciis ridigi la aliajn ĉar tion postulis la elektita metio : metio, kiun li plenumis ĝis la lasta « vespero ». Kiam oni admon-petis lin ne teatr-ludi ĉar videble liaj lastaj fortoj estis elĉerpitaj, li respondis : « Estas kvindek malriĉaj laboristoj, kiuj atendas sian salajron por vivteni. Mi riproĉus min se nur unu solan tagon, mi rifuzus al ili panon ».

Tiu diraĵo, kvankam multfoje citita, tiel bone bildigas la homon, ke daŭre oni devas ĝin ripeti... kaj mediti !

B. CHEVERRY.

KARNOVORAJ PLANTOJ

La karnovoraj plantoj naskigis timigajn legendojn - Kia estas la vero ?

En 1878, la germana botanikisto, Carl Liche, raportis en ĵurnaloj pri sia ekspedicio en la arbaroj de Madagaskaro. Lia rakonto ĵetis Eŭropon en hororon kaj nekredeblecon.

En la Sudoriento de la insulo li renkontis la tribon de la « MKODOJ » ; ĉi tie, li ĉeestis ritan buĉoferon de virgulino oferita kiel nutraĵo al « demono-arbo », kanibala arbo, por pacigi la koleron de la dioj.

« Tiu arbo, li skribis, havas trunkon altan je 2 metroj, kovrita je skvamoj, similaj al ananaso-ŝelo ; ce ĝia suprajo troviĝas blanka floro tre larĝa, ĉirkaŭ kiu pendas 8 folioj senmovaj, longaj je 2-3 metroj kaj hirtaj je dornoj Fine de longa religia ceremonio, la junulino, elektita de la sorto, estas apogata ĉe la trunko. Tuj la stamenoj de la floro longiĝas, atingas la korpon de la viktimo, ŝin ĉirkaŭprenas por ŝin levi. Tiam, diris la scienculo, la tentakloj kuŝas la korpon de la junulino sur unu el la folioj, kiu refaldiĝas. La dornoj eniras la karnon, la sango ŝprucas kaj fluas laŭ la tigo, dum la folio skuiĝas dum longaj minutoj, kiel mano de panisto, kiu knedas paston. La timiga digesto daŭras longan kvaronon de horo. Kiam la planto ĉesas skuiĝi la reĝo MKODO ĵetas longan ĝojegan krion. La tuta tribo stariĝas kaj komencas ĉirkaŭ la arbo furiozan dancon, kiu daŭras ĝis la krepusko. Kaj la viroj ekbruligas la diablan planton ».

Tiu rakonto aperis, inter aliaj revuoj, en la « Scienca Jurnalo de Karlsruhe » ; ĝi naskigis en la scienca mondo nur ĝeneralan nekredeblecon. Nenia kontrolo okazis en Madagaskaro por certigi ekzistadon de tiu homomanĝanta arbo.

De ĉiam la karnovoraj plantoj forte impresis la imagon de la homoj. Jam en la XVI-a jarcento la maristoj multe parolis pri giganta karnovora planto, kiu troviĝis en atolo nomita « Insulo de Morto » de la suda Pacifiko. Se iu, senatente, spiris ĝian parfumon, li falis senmova inter siajn petalojn ; vivanta, li estis digestita.

En USONO, ĉirkaŭ la jaroj 1900, samaj legendoj estis rakontitaj : en Filipinoj S-ro Bryant, plantisto, estis preskaŭ kaptita de enormaj lianoj ; ĉirkaŭ la arbo, kiu eligis pestan odoron kuŝis ostorestaĵoj.

Sed neniu esploristo, neniu scienculo povis certigi la realecon de tiaj premsonĝoj.

Tamen la karnovoraj plantoj vere ekzistas, kun tiu diferenco, ke ili estas tre malgrandaj kaj ke la viktimoj ne estas pli grandaj ol insektoj.

Viando, ovoj, fromaĝoj egale digestitaj

La karno-manĝantaj plantoj la plej primitivaj estas la fungoj de la « Ŝimaĵoj ». Ilia micelio estas ŝmirita je ia gluaĵo en kiun gluiĝas vermoj kaj larvoj. Tiam la fungo aperigas ian fibran burĝonon, kiu eniras en la korpon de la senmovigita predo, invadas ĝian internon kaj asimilas ĝian vivantan substancon. Alia fungo havas « divertikulojn » radiantajn kiel fingroj de mano ; ĉe ilia ekstremaĵo estas bulo ŝmirita je suko ; tiu ĉi allogas la preterpasantajn tre malgrandajn bestetojn, kiuj prenas tiun bulon en sian buŝon. Tuj la logaĵo ŝveliĝas kaj invadas la internon de la besteto por ĝin digesti.

La kazo de la karnovoraj plantoj eksplikiĝas

La ordinaraj fungoj estas parazitaj plantoj, kiuj ne kapablas per si men fari la sintezon de la karbono-hidratoj kaj de la azotaj substancoj, nepre necesaj al ĉiu vivanta estaĵo. La karnovoraj fungoj ilin prenas sur la putriĝantaj organikaj folioj. Ili servas sin ĉe la fonto mem de tiuj substancoj : la vivantaj estaĵoj.

Pli neatendita estas renkonti tiajn morojn ĉe evoluintaj plantoj : la dukotiledonoj, kiuj havas radikojn, por enprofundiĝi en la grundon, florojn kaj foliojn, kiuj reproduktiĝas pere de grajnoj kaj kiuj posedas la klorofilon kapablan fari la sintezon de la organikaj substancoj.

Tamen inter ili la karnovoraj plantoj kapablas rekte asimili lakton, viandon, ovojn, fromaĝojn.

La Drozeroj grupas centon da specioj, kiuj renkontiĝas en la torfejoj de la nordhemisferaj montoj, ĉar ili bezonas la acidecon de la ĉi tieaj muskoj. La drozero de Svisujo, Francujo, Usono havas rondajn foliojn ; ĉe ekstremaĵo de ĉiu el ili troviĝas petiolon longan je 5-8 mm., enhavantan proksimume 200 glandajn harojn kun vivruĝa koloro (Darwin, kiu ilin priskribis nomis ilin « tentakloj »). Tiuj glandoj sekrecias sukeritan purpuran likvoron, kies gutoj falas sur la folion, brilas sub suno kaj allogas la insektojn.

Jen muŝeto : allogita de la efluvoj de la ruĝa likvoro, ĝi venas sur la guton kaj gluiĝas. De tiam la tentakloj ekagas, kurbiĝas internen, kiel grifoj, sur la predon, kiu estas digestita, vivanta. La funkciado de la kaptilo — lenta kaj senkompata — daŭros, laŭ la kazoj, inter 20 minutoj kaj 24 horoj. La planto havas tempon : la insekto kaptita en la siropo ne povas eskapi ! La nutraĵo lente solviĝas dum 4-5 tagoj se la digesto estas normala, dum 10 tagoj se ĝi estas malfacila, kaj transformiĝas en ian ĉilon, kiu fluas sur la folieto kaj estas sorbita de specialaj papiloj.

Misteroj de la vegetala sensiveco

La botanikistoj multe interesiĝis pri tiu fenomeno. La vegetaloj havas nek nervan sistemon, nek sensivecajn organojn. Tamen nur plumo, nur haro (kiel eksperimentis Darwin) ekfunkciigas la kaptilon, dum nek pluvo, nek bruska frapo de la najbaraj plantoj skuitaj de la vento, okazigas reagon. La kaptilo funkcias je rapideco 2 mm. posekunde (dum ĉe bestoj la nerva influko varias inter 20 m. kaj 100 m. posekunde).

Ne temas pri kuntiriĝo de la ĉeloj. Kelkaj naturalistoj opinias, ke estas hormono, kiu agas : la « aŭkino », hormono de la kreskado ; aliaj pensas pri la « posttraŭma », kies kemia formulo estas C 12 - H 20 - O 4. La kemia substanco agas sur unu flanko de la tentakloj por ĝin kurbigi. Estas la sama mekanismo, kiu turnigas folion al la lumo aŭ kreskigas tigon inverse de la tera altiro. Tiu mirinda kaptilo funkcias nur 3-4 fojojn dum la vivo de la planto, kiam ĝi estas juna, kun tentakloj suplaj. Pli poste ili duriĝos kaj la kaptilo ne plu funkcios.

Nenia apetito por la ne-azotaj nutraĵoj

La insekto estas kaptita, la ĉeloj de la tentakloj ŝveliĝas, la cirkulado de la purpura suko, ekstreme potenca, plirapidiĝas. Eĉ, tiu sekrecia procezo povas okazi, kiam la viando estas, ne sur la folio, sed nur apude, pro la fortaj efluvoj de la nutraĵo. La digesta tubo de drozero atakas eĉ la ostojn kaj montras nenian intereson por la ne-azotaj substancoj (sukero-celulozo-oleo — gumo). La kaptilo malfermiĝas kaj tiujn ĉi forĵetas, ne tuŝitaj. Tiu

suko entenas diversajn enzimojn, analogajn al tiuj de la homa stomako, inter kiuj la pepsino. Kiel homa stomako, tiu kaptilo plenumas tri kondiĉojn : ekscitado kaj sekreciado de la digestaj glandoj, medio forte acida, perfekta asepso.

Eksperimente oni lokis pecon de viando sur folion de drozero : ĝi restis perfekte asepsa, ne poluciata de mikroboj, dum atestanta viando lokita sur musko komencas putriĝi post kelkaj horoj.

Aliaj karnovoraj plantoj

La Drozofilo, pli rara, renkontiĝas en la aridaj zonoj de Nord-Afriko kaj Hispanujo : ĝiaj belaj folioj punktitaj je rubenruĝaj makuloj atingas 20-30 cm. ; ili estas veraj « muŝo-mortigaj paperoj » ; ĉi tie nenia mekanismo, ĉio okazas sur la folio mem. La insektoj estas altirataj de la suko sekreciata de la folio ; la besteto gluiĝas ĉe gluaĵa brancheto kaj ilia karno estas iom post iom solvita de la digesta suko. Fine de la operacio, nur kelkaj nedigesteblaj pecoj de la viktimo restos sur la folio.

La Dioneo troviĝas en USONO (Norda Karolino). La kaptilo estas tre perfektigita : la folio mezuras 3-4 centimetrojn ; ĝi estas faldita laŭ centra nervuro kaj laŭ angulo 45°-a ; ĝi similas valvojn de malfermita ostro ; la du bordoj estas borderitaj je multaj pintoj sufiĉe duraj, kiuj kuniĝas interplektiĝante ; ĉiu interna flanko de la folio havas 3 pikilojn, kiuj rolas kiel ŝaltiloj. Abelo venas, altirata de la sukera suko, tuŝas la pikilojn, kiuj ekfunkciigas la kaptilon : la valvoj fermiĝas kaj la glandoj sekrecias la digestan sukon, kaŝitan en la dikeco de la folio.

Naturalisto Flouan Casendey opiniis, ke la glandoj, perdante sian sekrecion malŝveliĝas ; la premo malpliiĝas kaj okazigas la fermadon de la valvoj. Fine de la digesto, la glandoj denove ŝveliĝas kaj la pli forta premo permesas malfermadon de la kaptilo.

La Nepentesoj estas tropikaj karnovoraj plantoj de Nederlandaj Insuloj kaj Madagaskaro. Ili alkroĉiĝas al arboj kiel hedero. Ilia stomako konsistas el kelkaj grandaj folioj longaj je proksimume 30 cm. ; ĉiu el ili volviĝas kiel urno, garnita je fermo-kovrilo. Dum la juneco de la Nepenteso tiu kovrilo restas fermita, kvazaŭ ĝi volus konservi al la planto ian virgecon, malfruigante ĝian karnovoran staton. Kiam la planto iĝas adolta, la kovrilo malfermiĝas por neniam plu fermiĝi ; ĉi tie nenia mekanismo : la insekto tute simple falas el la urno, allogita de la nektaro, kiu ĝin nur trione plenigas ; la besteto gluiĝas en la siropo ; plie la urno estas tapetita de multaj haroj orientitaj supre malsupren ; ili malpermesas foriron de la besteto ; la suko, forte acida, ĝin digestas.


La Utrikulario aŭ Milfolio vivas en la dolĉaj akvoj de Tropikoj ; nur la floroj montriĝas sur la suprajo de la marĉoj ; la multaj folioj anstataŭas la radikojn kaj nagas, tute mergitaj en la akvoj ; ĉiu el tiuj folioj estas garnita je granda kvanto da utrikloj, duonsferaj, diafanaj, longaj je 2-3 mm. ; ili estas la kaptiloj ; ĉiu estas rezervujo garnita de haroj kaj de perfida enirpordo, kiu nur internen malfermiĝas ; ĉi tie la viktimoj estas nur etaj bestetoj : larvoj de moskitoj, vermoj, akvaj insektoj. Darwin faris multajn eksperimentojn, sed ĉiufoje la peco de viando lokita ĉe la enirejo ege rapide malaperis kaj same rapide la pordo refermiĝis.

Flouan Casedey rimarkis, ke la bestetoj estis kaptitaj ĉe ilia postajo, kvazaŭ ili estus retroe sučitaj.

Hodiaŭ la naturalistoj konas la funkciadon de la mirega utriklo. La alloga suko troviĝas sur la kelkaj haroj situantaj ekster la pordo ; la insekto venas, per sia postajo tuŝegas la pordon, kiu malfermiĝas ; samtempe la akvo rapidegas en la utriklon kaj agas kiel sifono, klu tiras la insekton internen ; la nura elasteco fermas la pordon ; ĉi tie la insekto ne estas digestita de suko sed putriĝas.

La biologoj ankoraŭ miregas antaŭ tiu paradokso : iuj plantoj, kiuj havas ĉiujn necesajn organojn por sin nutri estas ankaŭ karnovoraj ! kial ? ĉu temas pri « kruelajoj » ?, ŝajnas ke la plantoj — kutima nutrajo de la superaj specoj volas iel « sin venĝi » ! Tamen, tute propra homa estas tiu nocio ! La respondo estas tute alia :

De unu aŭ du miljardoj da jaroj la vivantajojn sin nutras, reproduktiĝas kaj evoluas. La Naturo, por ilin protekti havigis al ili abundon da miregaj solvoj al tiu ĉefa problemo : la Nutrado !



HUNDA MONDO

SATIRAJ VERKETOJ DE LADISLAO TIHANYI

I. — EŬGENIKO, AŬ HOMAJ LEĜOJ POR LA HUNDOJ

En nia lando, cele al pliperfektigado de la hundorasoj, la posedantoj de purrasaj profitas impostfavorojn, kiam, kontraŭe, havantoj de miksdevenaj estas submetitaj al serioza imposto.

Kompreneble, la posedantoj de purrasaj hundinoj tre atentas la seksrilatojn de la reproduktantinoj kaj zorge gardas ilin de alirasaj virhundoj. Sed, ankaŭ hundamo povas perfidi la hom-atenton : La bredanto atendas altvalorajn hundidojn kaj la impertinenta ino naskas fi-bastardojn ! Kion fari ? Tiam, plej ofte, la bredanto tuj ekzekutas la nov-naskitajn. Sed, beletaj, amindumaj hundo-beboj tre plaĉas al la infanoj. Ili plorpetas, petegas al patro mildkora, kiu prokrastas la ekzekuton. Ve ! Ili ne konscias pri la danĝeroj kiuj atendas la kreskantajn bestojn.

Car leĝo malpermesas al Sciencaj Institutoj uzi por eksperimentoj bonrasajn hundojn, nur miksdevenajn ili aĉetas. Tiucele, kelkaj provincaj maljunuloj bredas tiajn. Tamen, pro malalteco de la profito, neniam la oferto superas la bezonojn, kaj, sekve, la aĉetantoj ne postulas de la vendantoj severajn atestojn : Por ili, hundoj ŝtelitaj, aŭ ne, samvaloras, kondiĉe, ke ili ne estu purrasaj. Ho ! Kiel do la vivo de la bastardoj estas senĉese endanĝerigata !

Ja, se ŝtelisto ekprenas vagabondan bonrasan hundon, li transportas ĝin en iun specialan kolonion, kie la posedanto povas elaĉeti ĝin. Se neniu venas, la Bestprotekta Asocio prizorgas la hundon ĝis kiam nova posedanto « adoptos » ĝin. Sed, miksdevena hundo rapide iras al Scienca Instituto, aŭ se ĝi ne taŭgas estas ekzekutita.

Bonŝance, la hundoj ne konas niajn leĝojn, kaj sincere amas la homojn.

Tiu-ĉi meditado enkondukas sekvantajn hund-historietojn kaj emas al komprenigi ilin.

II. — LA ROMP-ŜTELISTO

Mia amiko rakontis :

Apud mia trietaĝa ludomo staras privata vilao, kies posedanto havas du infanojn. Iun tagon, tiuj-ĉi ricevis hundeton kiel ludamikon. Sed, la hundeto kreskis kaj komencis vagadi, kio devigis la posedanto ligi la beston, ĉar miksdevenan, al ĝia hundejo.

Bedaŭrinde, por tion fari la mastro ne elektis la ĝardenparton antaŭ la domo, laŭlonge de la strato, sed la fundon de la malantaŭa korto ne malproksime de la ludomo, kie loĝas mia amiko. Tiel, la hundo ne nur perdis sian liberecon, sed plue restis tute sola, malproksime de sia mastro, de siaj ludamikoj.

Ĝi komencis plendeme bojadi, hurli.

Ve ! Inter la loĝantoj de la ludomo estas nervozaj homoj. Mia amiko eĉ asertas ke tie loĝas la plej abomenindaj homaĉoj de la mondo ! El ili, la domkuratorino kiu ĉiam embuskas la loĝantojn tra la pordo, tra la fenestro por, poste, rakonti terurajn aferojn al ĉiu loĝanto pri la aliaj. Unu, ŝi diras, havas « slipon », « frenezulo-slipon », kio signifas, laŭ vulgara lingvo, dokumenton kiu atestas ke ĝia posedanto estas vera frenezulo, ne respondeca pri siaj faroj. Ekzemple, en la jaro 1956, tiuĉi frenezulo direktis armilon al la domkuratorino kiu svenis kaj terenfalis. Domaĝe, konkludas kelkaj, ke tiam, la frenezulo ne mortpafis ŝin !

Do, la kunloĝantoj suferis pro senĉesa tirbojado. Eĉ se kelkaj malice ĝojis pri la suferego de la malamikaj, abomenindaj kunuloj, finfine la pacienco de ĉiuj elĉerpiĝis kaj la loĝej-komitato petis la hundo-posedanton ĉesigi tiun-ĉi ne elteneblan bruon.

La mastro insulte respondis, ke li pagas multekostan imposton, do, ke en sia propra ĝardeno li rajtas meti la hundon tie, kie plaĉas al li.

Tiun sintenon ne toleris la najbaroj, kiuj sekrete komencis plani iun solvon.

Venis milda somera aŭroro.. Kiel kutime, la hundo komencis amare hurladi. Terure estis. Tiam okazis. La hundo subite eksilentiĝis. La torturitaj najbaroj malpeze ekdormis. Sed, matene, indigna blasfemado vekis ilin kaj mian amikon ! La hundo-posedanto kriegis : Fiaĉo ! Rompŝtelisto ! Fia rompŝtelisto !

La kunloĝantoj eksciis de la klaĉema dom-kuratorino, ke iu surgrimpis kaj transpasis la ĝarden-palisaron, malligis la hundon kaj metis antaŭ la hundejo papercon kun teksto surskribita per majuskloj :

— Venontfoje, mi forvendos la hundaĉon al instituto !

La mastro rapide retrovis la hundon ĉe la hejmosojlo kaj, ne malpli rapide, translokigis la hundejon antaŭ la fasad-fenestroj.

De tiu tempo, la hundo silentas ĉar ĝi vivas en la proksimeco de siaj mastroj.

III. — VENONTFOJE KIUN MORDOS LA HUNDO ?

Pasintjare, mi feriadis en ripozejo ĉe Danubbordo.

La modernaj homoj nur malfacile povas sin eligi el la rapida drivo de la nuntempa vivo. Dum mia feriado, mi devis dufoje reiri en mian laborejon, okaze de kromlaboro. La kromlaboro en mia laborejo estas privilegio, kiun nur stultuloj aŭ frivoluloj cedas al aliuloj. Do, en mia malproksima ripozejo, mi ĝoje akceptis la asignilon. Cetere, mi bone scias, ke se mi estus ferianta en mia propra hejmo, anstataŭ ripozi mi ĉiam laborus !

En la ripozejo, dum la pluvaj tagoj, eble ni mortus pro enuo se kelkaj nervozaj frenezuloj ne amuzus nin.

Dum mia restado, iu disputema gasto ĉiutage malaŭdis la mangaJojn al la direktoro, ofte skribis sur la plende-libron. La trian matenmangon, Jaluza edzo publike riproĉis al sia beleta edzino malfidelecon kaj laŭte minacis la audacan amindumanton. Bela skandalo estis. Kaj la kvercelon akompanis laŭta bojado de la granda, nigra hundo de la hotel-direktoro.

De mia alveno, mi ekvidis ke tiu hundo ludas seriozan rolon en la hotelo. Ĝi aspektis grava ĝis kiam, malfideme, ĝi flaretadis la piedojn de ĉiu gasto. Neniam ĝi svingis la voston.

— Devas esti mordema bestaĉo — diris al mi nova konatulo.

Mi rememoris pri lia rimarko, kiam, post la tria vespermanĝo, la hundo mordis la disputeman nervozan gaston. La viro paliĝis pro kolerego. Sed, jam la direktoro kaj la pordisto flegis lin. Ili forlavis la sangogutojn, ŝmiris la cikatron per jodoformo, kaj bandaĝis. Dume, ili senĉese kvietigis la kuracaton. Kaj, kiel surprizo ! La nervozulo kvietiĝis ; Eĉ placis al li, ke la direktoro kaj la pordisto prizorgu lin tiel fervore.

Poste, mi iris rigardi la televidon, sed la filmo estis tiel stupida, ke mi foriris por promeni. Ve ! La pluvo malhelpis al promenado kaj mi komencis interparoladon kun la pordisto. Hazarde mi demandis : — Ĉu la hundo de la direktoro ofte mordas la gastojn ?

— Jes, ĉiumonate du, tri, eĉ kvarfoje,... kaj ĉiam ĝi elektas la plej malsimpatian gaston — ridete diris la pordisto.

— Cu eblas, ke dum nia feriado estos ankoraŭ alia viktimo ?

— Tre verŝajne, ĉar en tiu-ĉi societo estas ankoraŭ pluaj antipatiaj gastoj. Se vi ŝatas ludi, vetu kun mi je glaso da biero, ke ĝi venontfoje mordos tiun grandhararan fripononon, kiu ofte hurligas la radioaparaton.

— Bone, mi vetas kun vi. Sed mi opinias, ke la sekvonta viktimo estos la grasa maljuna fraŭlino en minijupo, kiu tiel malagrable kaj laŭte parolas kiel papago.

— Vi eraras, ĉar mi observis ke la S-ro Direktoro koleras kontraŭ la grandharara fripono. Krome, ankaŭ la hundo ĉiam observas sian mastron. Racia hundo. Ĝi serĉas la okazon plezurigi la direktoron.

— Ĉu la direktoro ankoraŭ ne suferis malagrablaĵojn pro la konduto de sia hundo ?

— Jes. Sed, li havas bonajn amikojn, grandinfluajn interrilatojn, kaj en tiu-ĉi ripozejo ne feriadas « granda hundoj » (En Hungarlando, laŭ la ĉiutaga lingvo, la esprimo « granda hundo » signifas influkapablan ŝtat-oficisto). Oni uzas ĝin ankaŭ pli ĝenerale, kaj ĝi ofendas neniun. Por ĉiu subulo, iu ajn estro povas esti « granda hundo », kaj tiu-ĉi ĝenerale fieras senti respekton kaj estimon sub tiu ŝerc-nomo.

Dum la dua semajno, la pordisto gajnis la veton : La hundo mordis precize la antipatian fripononon.

-:- La Vagado dum le Kursotempo -:-

(Eltirita de la verko de Frederiko Mistral :
« MEMORAJOJ KAJ RAKONTOJ)

Ĉirkaù mia oka jaro, — kun blua saketo por meti mian libron, mian kajeron kaj mian manĝeton, — oni irigis min al lernejo.

En tiu tempo, la revo de ĉiuj, kiuj iris kun mi en la lernejo estis fari unu « *plantie* ». « *Plantie* » signifas en Provenclando, petola forkuro kiun faras la infano malproksime de sia patra domo sen averti siajn gepatrojn, kaj ne sciante kien li forkuros.

Tio estas agrablega kaj nekomparebla afero, je tiu aĝo, senti sin absoluta mastro kaj tute senbridigata.

Sed venas malsato. Se tio okazas dum la somero, oni trovas kvadratajn bedojn da faboj. la ĝardenojn kun iliaj pomoj, iliaj piroj, iliaj persikoj, kaj la ŝvelitajn melonojn kiuj krias « mangu min ».

Sed se tiu « plantie » okazas dum vintro, estas necese tiam esti elturniĝanta.

Mi, kiel miaj kamaradoj kaj kiel ĉiu bona Provencano, post tri monatoj ke mi estis lernanto, faris mian « plantie ».

Tri aù kvar bubaĉoj, kiuj venis min atendi je mia foriro al la lernejo, diris al mi : « He, simplulo ! venu ludi kun ni ». Kaj mi diris al mi mem : « Al la lernejo, mi iros morgaù ».

Kia feliĉo mia Dio !... Sed ĉio finiĝas.

Iun tagon mia patro, informita de la instruisto, diris al mi : « Aùskultu Frederiko, se vi ankaù ne iros al la lernejo, mi frakasos tiun vergon sur vian dorson ».

Post tri tagoj mi ankaŭ ne iris en la lernejon. Ĉu mia patro kaŝobservis min ? — Jen ! dum ni vagadis en akvo, subite, mi vidis je tri dek metroj antaù mi, aperi mian patron. Mia patro kriis al mi : « Vi scias, kion mi promesis al vi, mi atendos vin tiun vesperon ».

Kaj miaj kamaradoj kantadis :

— Aj ! aj ! aj ! la bato ; aj ! aj ! aj ! sur via haùto !

— Vere, mi diris, certe batota, mi tuj faros « plantie ».

Kaj mi foriris. Mi ne scias kien. Kiam mi estis marŝinte dum unu horo aù unu horo kaj duono, ŝajnis al mi ke mi alvenis ĉe Ameriko.

La suno malsupreniĝis mi estis laca kaj timigata. — Estas malfrue vespere, mi pensis, mi estas devigata peti gaston en iu farmdomo.

Kaj malproksimiĝante de la vojo, mi direktiĝis al kampardometo, kiu havis plaĉeman mienon. Timigata mi iris sur la sojlo, kaj mi vidis malpuregan maljunulinon. Por manĝi tion, kion ŝi tuŝis estus necese esti malsatega.

La maljunulino estis almetinta teren meze de la kuirejo bolpoton el kiu ŝi eltiris buljonon, kiun ŝi verŝis sur tranĉojn da ŝima pano, ĉiam gratante ŝin.

— He ! mia avino, ĉu vi faras supon ?

— Jes, respondis ŝi, kaj de kie vi venis ?

— Mi estas Majlanano, mi diris, mi faris petolan forkuron, kaj mi petas de vi gastadon.

— En tiu okazo, diris plue la malbelega maljunulino grumblante, sidiĝu sur la ŝtuparon por ne eluzi niajn seĝojn.

Mi sidiĝis sur la unuan ŝtupon.

— Mia avino, kiel nomiĝas tiu lando ?

— Papaligoso.

— Papaligoso !

Vi scias, kiam oni parolas al la infanoj pri malproksima lando, la saĝaj personoj diras kelkafoje « Papaligoso ». Tiel tuj kiam la maljunulino diris al mi tiun nomon, malvarma ŝvito fluis sur mia dorso.

— Ha ! Ha ! diris la maljunulino, kiam ŝi estis fininta sian laboron, en tiu lando la mallaboruloj ne manĝas... se vi volos supon vi devos gajni ĝin.

— Volonte, kion mi devas fari ?

— Ni lokos nin ambaù sur la ŝtuparo kaj ni ludos salti ; tiu kiu saltos la plej malproksimen manĝos la bonan supon... la alia manĝos per la okuloj.

— Mi bone volas tion fari.

Kaj mi pensis :

— Estos eksterordinare se tiu maljunulino lametigita saltos pli malproksimen ol mi.

Kaj la piedoj kunmetitaj, ni tuj lokis nin sur la ŝtuparo.

— Kaj mi diras : unu, diris la maljunulino balancante siajn brakojn por sin prepari al saltado.

— Mi diras : du.

— Mi diras : tri !

Mi impete per miaj tutaj fortoj saltis. Sed la maljuna maliculino, kiu ne saltis, tuj fermis la pordon, ŝovis la riglilon kaj kriis al mi :

— Bubaĉo ! reiru ĉe viaj gepatroj. kiuj estas certe maltrankvilaj pri vi.

Mi restis konsternita kiel truita korbeto.

Malantaù la farmodomo estis vojeto, mi ekpaŝis en ĝi ; kaj marŝu Frederiĉjo !

Suririnta kaj malsuprenirinta multajn montetojn mi estis lacigita... Pripensu, mi ne plu manĝis de tagmeze. Fine mi ekvidis en vinberujo kadukan dometon. Ĝiaj muroj fendataj estis nigritaj per fumo ; nek pordo nek fenestro ; kaj la traboj, kiuj estas subtenitaj nur de unu ekstremaĵo treniĝis teren.

Laca, senforta, mi tre bezonis dormi, mi supreniris sur la plej dikan trabon kaj mi profunde endormiĝis.

Mi ne scias kiom da tempo mi dormis. Sed meze de mia dormo ŝajnis al mi vidi subitan brulejon, tri viroj sidantaj ĉirkaŭ parolis kaj ridis.

Post unu momento, fumado sufokis min ; mi laùte kriis je timo.

Tri vizaĝoj turnis sin al mi kun teruraj okuloj...

— Ne mortigu min ! ne mortigu min ! mi kriis.

La tri bohemuloj, kiuj estis tiel timigitaj kiel mi ekridis. Ili malsuprenigis min de mia grimpilo kaj demandadis al mi de kie mi estis veninta kaj kiel mi trovigas tie.

Kaj tute trankviligita, unu el la ŝtelistoj diris al mi :

— Ĉar vi faris « plantie » vi certe estas malsata... Jen, manĝu tion.

Kaj li ĵetis al mi, kiel al hundo, ŝafan tranĉaĵon duonkuiritan.

Tuj kiam ni estis manĝintaj, ili leviĝis kaj parolis mallaùte ; poste ili diris al mi :

— Jen, junulo, ni ne volas fari malbonon al vi, sed por ke vi ne vidu kien ni foriros ni tuj metos vin en tiun barelon.

— Metu min en tiun barelon, mi diris kun obea mieno. Oni prenis min per postaĵo kaj, klak ! en la barelon. Mi kaùris en ĝi kiel fadena volvaĵeto, kaj mi preĝis mallaùte. Sed subite mi aùdis ion, kiu vagadis ĉirkaù mia barelo ; mi retenis mian spiradon. Kio do estas ankoraù tio ?... Mia koro batadis kiel horloĝo.

La taglumo ekaperis, kaj la piedpremado malproksimiĝis ; mi rigardadis tra la bareltruo... Kion mi vidas ? Lupon ! tiel dikan kiel azeno ! kun brilantaj okuloj. Mi tiel timis noktan aperon, ke vidi lupon redonis al mi kuraĝon. La lupo, kiu iom malproksimiĝis, revenis pro la movo kiun mi faris, kaj jen ĝi, denove turniĝante ĉirkaù la barelon kaj vipante ĝin per sia vosto. Mi trapasas mian maneton tra la bareltruo, mi ekkaptis la voston, mi tiris ĝin interne, kaj mi kaptis ĝin per miaj manoj.

La lupo, kiel se ĝi havus kvin cent diablojn poste, forkuris trenante la barelon tra ŝtonplenaj vojoj, tra vinberujoj.

— Aj ! mia Dio ! Sankta Maria ! Sankta Jozefo ! mi ploradis, se la barelo rompiĝos la lupo mortigos kaj manĝos min.

Subite la barelo rompiĝis, la vosto eliris el miaj manoj ; kaj malfermante la okulojn mi vidis tre malproksime mian lupon, kiu forkuris. Mi estis sur la vojo iranta de Sankta Remi ĝis Maillano, ĉirkaù unu kvaronhoro de mia patra farmodomo.

Ne necesas diri al vi, ke post tiaj emocioj la patra vergo ne plu timigis min.

Malantaù la farmodomo mia patro plugis, li levis sian kapon ridante, kaj diris al mi :

— Alkuru ĉe via patrino, ŝi ne dormis dum la tuta nokto. Al mia patrino mi rapide alkuris. Mi rakontis al miaj gepatroj miajn belajn aventurojn. Sed, kiam mi parolis pri la ŝtelistoj, la barelo kaj la dika lupo, ili diris al mi :

— He ! simplulo, estis la timo, kiu sonĝigis tion al vi ! Malgraù miaj asertoj neniu volis kredi min.

El la Provenca lingvo esperantigis

Claudine BOURDELON

Kiam la Mezepokuloj libertempis...

Ja, kompreneble, ni multe ĝojas pri nia 4-semajna libertempo. Sed, kio ajn ŝajnus, ni malpli multe libertempas ol niaj XIII-jarcentaj prauloj !

Certe tiuj ĉi suferis pri tre rigoraj laborkondiĉoj : ili restadis ĉe sia laboro de la « komenciĝanta tago ĝis la finiĝanta tago » ; tio estis, en vintro, de la 8-a horo ĝis la 18-a, kaj, en somero, de la 4-a ĝis la 21-a !

Sed mastroj, submastroj kaj metilernantoj povis facile malstreĉiĝi dank'al multaj liberaj tagoj. Tiu favora situacio estis ŝuldita al Eklezio, kiu, konsente kun administraj kaj korporaciaj estraroj, devigis la laboristojn (minacante ilin je monpuno) nelabori dum la dimanĉoj kaj la devigataj festoj.

En Parizo la panistoj ricevis 78 ripoz-tagojn (52 dimanĉoj + 26 festo-tagoj) dediĉitaj al kulto pri Kristo, Virgulino kaj Apostoloj. Plue estis malpermesite labori dum la posttagmezo, kiu antaŭis tiujn dimanĉojn kaj festojn. Tio egalvaloris proksimume 39 tagojn. Eĉ la parizaj fulistoj, en la XIII-a jarcento ĝuis veran semajno-finon : la tuta sabato antaŭ festo estis nelabora ; ili profitis tiun sabaton por religiaj okupadoj ; eĉ ankaŭ Sankta Ĵaŭdo, Vendredo kaj Mardo de Pasko, Lundo kaj Mardo de Pentekosto.

Konklude : 121 tagoj por la panistoj kaj 161 por la fulistoj. *Sed ne estis ĉio :* okaze de vilaĝa aŭ urba Patrono, oni feriis dum la tuta tago kaj la posttagmeza antaŭtago.

Estis religia aŭ korporacia festoj : proksimume 6 festoj dum la jaro, do 9 libertagoj.

Ankaŭ okaze de privataj festoj : oni feriis por la festo de la mastro, de la laboristoj kaj de ilia edzino. Kiam laboristo mortis la tuta kunfrataro (mastro, laboristo, metilernanto) ĉeestis la funebran ceremonion, kiu okazis en la mateno. Post la manĝo, preparita de la funebranta familio, plej ofte ĉiuj pasigis, fi edife, la posttagmezon en drinkejoj !

En la XIV-a jarcento kaj la XV-a, okaze de milita venko, de paco-kontraktado, de reĝa edziĝo, de princa naskiĝo, de solena alveno en la urbon de reĝo, reĝino aŭ princo, oni ankaŭ feriis. La korporacio sendis almenaŭ delegitaron, en granda pompo por digne akcepti la unuvesperan gaston.

Tio donis proksimume 15 tagojn.

La sezono-festoj kelkfoje respondis kun la religiaj festoj. Ekzemple : la Majo-Festo estis celebrita en la Unua de Majo (tago de S-to Filipo kaj S-to Jako). La Rogacioj okazis la 20-a de Majo. Entute 146 tagoj por la panistoj kaj 188 por la fulistoj. Kio estas po-semajne : 3 libertagoj !

Oni povas ankaŭ noti, ke la dratigistoj, kiuj fabrikis draton, sendube el kupra alojo, povis ankaŭ ricevi unu liberan monaton en aŭgusto.

Do, la Mezepoka laborista vivo montriĝas malpli aĉa ol oni povus supozi. Sed tiu reĝimo estis agrabla nur, ĉar la laboristoj estis pagitaj plejparte per loĝejo, nutro, vesto, kaj aliparte per monata aŭ semajna salajro. Plue la kontrakto kun la Mastro valoris dum pluraj monatoj eĉ dum pluraj jaroj.

Sed la XV-a jarcento alportis tute novan farmanieron ; ĉar la komercaj interŝanĝoj pli kaj pli multiĝis, oni pli kaj pli fabrikis. La mastroj havigis al si pli kaj pli grandan monprofiton. Dume la laboristoj ricevis nur po-horan salajron ! kaj estis tro da nepagitaj festo-tagoj !

La « ŝuflikisto » de La Fontaine, franca fablisto, ĝuste esprimis tiun turmenton

« La malbono estas, ke en jaro enestas tro da tagoj,
en kiuj oni ne rajtas labori,

Oni ruinigas nin per festoj ; tiuj ĉi malutilas al tiu,
kaj Sinjoro Abato.

Ĉiam anoncas, en sia meso-mesaĝo, novan Sanktulon ».

Eĉ Ludoviko la XIV-a estis malkontenta pri tiom da festoj. Li nepre deziris fin-konstruigi Louvre-Palacon kaj Monsinjoro Hardouin de Perefixe, arkiepiskopo en Parizo, pretekstante, ke la tagoj dediĉitaj al religio fariĝis diboĉ-tagoj, decidis nuligi 20 festotagojn (en 1660).

Sed la tradicioj estas fortaj kaj en julio 1673, pro energiaj postuloj, oni redonis kelkajn el tiuj festotagoj.

Fakte la XVIII-a jarcento kaj la Revolucio tute detruis tiun mezepokan socialan sistemon.

Dum pli ol unu jarcento la laborista medio estos submetita al la patrona arbitreco. Kaj estas nur iom post iom ke la laboristoj retrovos vivon, en kiu laboro kaj ripozo pli harmonie ekvilibriĝas.

POR VIA DISTRO

NIA KONKURSO

En ĉi-tiu numero, vi trovos la du lastajn problemojn de nia konkurso 72-73.

Bonvolu sendi la solvojn antaŭ la fino de la monato sekvanta tiun dum kiu vi ricevis la gazeton.

Ni akceptos la solvojn de la antaŭaj problemoj (de post la N° 5 Sept.-Okt. 72) samtempe kun la solvoj de la hodiaŭaj problemoj.

P. Chevalier
19, bd Gabriel-Lauriol
44000 Nantes (Francujo)

UNUA PROBLEMO (20 poentoj)

Bonvolu anstataŭigi la punktojn en la ĉisubaj frazoj per la taŭgaj vortoj. Estos kalkulitaj po 2 poentoj por ĉiu vorto ĝuste elektita, sed estos forprenita po 1 poento por ĉiu vorto malĝuste elektita.

1) Ili direktis ... okulojn sur la ondantan ŝaŭmon.

2) Ĉio, en pasio decidita, forpasas ... la pasio estas finita.

3) Se vi ... volas edziniĝi, prenu malsaĝulon.

4) Mi volus scii kiom ... la ŝtofo ili jam pretigis.

5) ... tro ĝentila ekstero mankas ofte sincereco.

6) Se oni volas agi, oni ... en la minutoj de la volo.

7) Pli bone estas iri unuokule en la ĉielo, ol ... en la inferon.

8) Diru al mi ... personojn vi vizitados, mi diros al vi, kia vi estas.

9) Ju pli oni posedas, ... pli oni avidas.

10) Antaŭ nelonge, tiu sinjoreto prenis loĝejon ... de mi.

DUA PROBLEMO (10 poentoj)
Oficeja Problemo

S-ro Grandestr, direktoro de la Universala Neĝblankiga Oficejo, en iu mateno tion diris al sia oficistino f-ino Julinjo :

— Fraŭlino Julinjo, jen skribaĵo, kiu devas esti kopiata en 140 ekzempleroj, kiel eble plej baldaŭ. Bonvolu tuj eklabori kun viaj koleginoj, fraŭlino Elinjo kaj fraŭlino Norinjo.

Estis precize la 9-a horo, kiam la tri maŝinskribistinoj eklaboris. F-ino Julinjo rapide skribis, ŝi pretigis unu kopion en 4 minutoj. Sed f-ino Elinjo bezonis 8 minutojn por unu ekzemplero, kaj f-ino Norinjo nur en 9 minutoj povis fini unu kopion. Ĉar la laboro estis urĝa, la tri oficistinoj diligente laboradis ĝis la pretigo de ĉiuj 140 kopioj. Nur unufoje ili interrompis la laboron, je la 11-a horo, por 5 minutoj, dum kiu tempo ili rapide eltrinkis sian kutiman tason da teo kaj interŝanĝis siajn opiniojn pri la vetero.

Nia demando nun estas : Kiam estis pretaj la tri oficistinoj kun la 140 kopioj, kaj kiom da ekzempleroj faris ĉiu el ili ?

PLIA DEMANDO :

Por dispartigi la eventualaj samgajnintoj, bonvolu indiki kiom da personoj partoprenis la konkurson.

KOREKTITAJ PROBLEMOJ (1971-1972)
Daŭrigo

N° 1 (1972)

Unua problemo

1) Mi ridas *pro* (aŭ *je*) lia naiveco.
2) Li *ja* estas plene kulpa, tamen oni devas *lin* kompati.
3) Plibone ne *sali* ol *sali* tro multe.
4) Li sukcesis *melki* monon el la grupo.
5) *Dum* la naciaj lingvoj estas rigidaj, Esperanto *kontraŭe* estas senfine fleksebla.
6) Li kredas sukcesi kaj *jam* ridetas.
7) Li *malofte* eraras sur la lingva kampo.
8) Multaj *preteriras* senatente antaŭ tiu bildo.

Dua problemo

La kaŝita frazo trovota estis la jena :

Sen Francujo la mondo estus vidvo (tia estas la opinio de la nederlanda literaturisto Jan Greshoff).

Sekvota.

GRAMATIKO PER BONHUMORO

GENRO

Difino (P.V.). Genro estas seksa karaktero de substantivo aŭ pronomo :

Vira : tajloro (li, lia - ĉj).


Virina : avino (ŝi, ŝia - nj).

Neŭtra : tablo (ĝi, ĝia).

Viro : animalo organizita por demeti en aliseksan animalon la semon de ido : koko.

Ino : sufikso esprimanta la sekson organizitan por naski idojn : kokino.

Homo havas tute ĝeneralan sencon : = homa estaĵo.



Atentu

Se la knabino plaĉas al vi, estu prudenta... pri la hundo, eble ĝi mordas.



Post vojaĝo

— Kara amikino, vi ne povas imagi. kiun belan vojaĝon ni faris !

— Ĉu vi vizitis Parizon ?

— Atendu, mi ne plu scias ; mi volas kontroli sur la biletoj ; ĉar estas ĉiam mia edzo, kiu okupiĝis pri tiuj biletoj.



Patrina lerteco

Ho ! karulino ! Kiom bone odoras ! Certe estas mia patrino, kiu venis hodiaŭ matene kaj jus okupis la kuirejon ! mi volas tuj vidi kiujn frandaĵojn ŝi preparas por sia kara knabeto !

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse 2, LINZ (45 aŭstr. ŝil.).
Belgujo : S-ro Guyot Mateo, 18, rue Chefneux, BARCHON, Lg. (85 fr.).
Britujo : S-ro Frank Ashpole, 127, Midford Rd, Combe Down, BATH BA2 5Rx (15 ŝil.).
Ĉeĥoslovakio : S-ro Dezidero Koronczi, Nabrezie Metoda 1707/16, PRIEDVIDZA (2 us. dol).
Danlando : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE. Ĝiro 6.83.46.
Finnlando : S-ro Jussi Jäntti, Esperantotie 4, SF 02220 IRISLAHTI (10 mk.).
Germanujo Okc. : S-ro Joseph Bode, 35 - KASSEL-OBERZWEHREN, Hinter der Brücke 22, pĉk. Frankfurt (M) 2347 59-601 (6,2 mk.).
Hispanujo : S-ino Jozefino Monter Palomar, Muntaner 416, 1°, la, BARCELONO (110 pes.).
Italujo : Itala Esperanto-Federacio, Via Po 7, TORINO (1.000 lir.).
Japanujo : S-ro Tara Nišiumi, 6-31-19 Kita-Koiwa Edogawa-Ku, 133, TOKIO - pĉ Tokio 44163 (640 jenoj).
Jugoslavio : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBJANA, poŝtfako 239 (1520 d.).
Nederlando : S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, CAPELLE AAN DEN IJSSEL, ZH pĉk. 209721 (7 guld.).
Norvegujo : S-ino Marit Delor, Solveïen 143-B, LJAN.
Peruo : S-ino Skotte, Malecon Paul-Harris, 336, Dto 200 BARRANCO (Lima).
Pollando : Pola Esperanto-Asocio, Jasna 6, VARSOVIO.
Rumanio : S-ro Adrian Boldan, al. Valea Rosie 4, ap. 69, B.P. 8/4 BUKURESTI - 66.
Sovetunio : S-ro Alik Melnikov, ab jaŝ 233 Rostov Don — 7.
Svedujo : S-ro Roland Dupuis, Helgagatan 36, uppg 13, STOCKHOLM Sö pĉk 157007 (10 kr.).
Svislando : S-ro Cl. Gacond, Miéville, 133 - 2314 LA SAGNE.
Tajlando : S-ro C.L. Unchitti, GPO box 1231, BANGKOK (2 us. dol.).
Usono : S-ro D.W. Hoffman, 1444 Leslie Street, HILLSIDE (N.J.) (2 dol.).
Aliaj landoj : Ni serĉas perantojn en aliaj landoj. Oni povas pagi la abonprezon per steloj (20 st.) aŭ respondkuponoj (12 respk.), per libroj aŭ per neuzitaj poŝtmarkoj. Sin turni al la Direktoro.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ
Maine-et-Loire
FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anonciatajn

Akceptas :

Por ripozi trankvile **en atmosfero frateca** ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

VENU AL LA ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo

Sablé-sur-Sarthe. — Imprimerie Coconnier

Le Gérant : P. BABIN.

Supplément au n° 2 de 1973, de « KULTURAJ KAJEROJ »

LA VIE DE GRÉSILLON

ENTRE NOUS...

L'Assemblée générale s'est réunie le 25 mars. Les deux tiers des sociétaires étaient présents ou représentés. Peu de sociétés peuvent se vanter d'une telle participation et nous remercions tous les amis qui, chaque année, donnent ainsi la preuve de l'intérêt qu'ils portent à la gestion de la M.C.E. Parmi les absents il y a ceux dont la convocation nous revient avec la mention « n'habite pas à l'adresse indiquée » et cela pour certains, depuis plusieurs années. Il y a aussi les membres décédés dont la famille ne s'est pas manifestée. L'article 7 des statuts prévoyant que lorsqu'un sociétaire vient à décéder « les héritiers cessent de faire partie de la société », l'Assemblée Générale a décidé que les parts des sociétaires décédés seraient, si les héritiers n'en demandent pas le remboursement, mises à un compte spécial.

Voici maintenant une liste de sociétaires « partis sans laisser d'adresse ». Si certains de nos amis connaissent leur domicile actuel ils nous rendraient service en nous le communiquant : Castel Robert, Carcassonne ; Cayrel Marcelle, Espalion ; Dumoulin Germaine, Tassin ; Estrade Odette, Gagny ; Falconnier Joseph, Ansigny par Albens ; Fauth Lina, Maelsheim ; Felgeirolles Jeanne, Clamart ; Gerault Denise, Crépy-en-Saonois ; Gilbert Jean, Thiers ; Grisier Marie-Louise, Moulin ; Jennequin, Avion ; Lacour Louis, Thiers ; Lahittète Denise, Les Essards ; Mme Le Roch, Rezé ; Mage Emile, Lyon ; Marin Robert, Montreuil-sous-Bois ; Mme Marsy, St-Flour ; Mendlewich Max, Lens ; Mme Mettier, Juranville ; Nicolaï Madeleine, S.P. 69649/ All. Féd. ; Nicolini Max, Marseille ; Philippot Madeleine, Toulouse ; Mme Riondelet, Lyon ; Rochette Marthe, Largentière ; Roux Georges, Orléans ; Roy Henri, Lyon ; Serichard, Le Mans ; Signoret Paul, Villeurbanne ; Stienne Eugène, Licques. Espérons que grâce à vous la liste en sera moins longue l'an prochain.

La saison d'été s'annonce assez bonne. Il nous reste cependant quelques places surtout pour le mois d'août. Mais il faut faire vite car de nouvelles inscriptions nous arrivent chaque jour. N'oubliez pas qu'une réservation n'est définitive que lorsque nous avons reçu le bulletin d'adhésion et le droit d'inscription. Nous ne pouvons pas réserver de chambre sans cela. Il nous est arrivé de le faire, de ne voir personne venir et de perdre une location après avoir refusé des demandes.

Alors, à cet été ?

P. BABIN.

ABONNEMENTS BIENFAITEURS 1972 (suite)

Mlle Duchamp (47)	15,00	Mme Grossi (13)	15,00	M. Martinez (13)	15,00
M. Bracquemond (63)	15,00	Mme Marquis (35)	15,00	Mlle Chatelus (69)	15,00
M. Gaudry (92)	15,00	M. Blouvac (93)	15,00	M. Epstein (39)	15,00
Sro Nanov (Bulgarie)	15,00	M. Bavay-Gilliard (59)	15,00	M. Bruguier (30)	15,00
M. Chatelain (14)	15,00	M. Ferrut (25)	20,00	Sro Tietti (Finlande)	15,00
Dr Védrine (69)	15,00	M. Salasc (34)	15,00		
M. Mathis (83)	15,00	Mme Moreau (06)	15,00	**Total**	**290,00**

ABONNEMENTS BIENFAITEURS 1973 (suite)

M. Prevot (44)	30,00	Mme Montagné (27)	15,00	M. Chasseriaud (17)	15,00
M. Phillipeau (44)	30,00	Mme Horault (49)	15,00	Sro Nagy (Hongrie)	15,00
Mme Despeyroux (69)	15,00	M. Lherbier (72)	15,00	Sro Halonen (Finlande)	15,00
M. Lezan (24)	15,00	M. Lecoq (37)	15,00	M. Gerrier (75)	15,00
Mme Boulay (72)	20,00	Sro Derks (Monaco)	15,00	Mlle Chini (13)	15,00
M. Verron (41)	15,00	Mlle Clavier (69)	15,00	Mme Jurquet (13)	15,00
M. Vilhelm (59)	15,00	M. Jelenc (U.S.A.)	15,00	M. Bellon (06)	15,00
Mme Macé (76)	15,00	M. Jelenc (86)	15,00	M. Batailler (13)	15,00
M. Ressort (13)	15,00	M. Schertzer (39)	15,00	M. Beau (13)	15,00
M. Decobert (59)	15,00	M. Turbellier (44)	15,00	Foyer Esp. Aix (13)	15,00
M. Massé (73)	15,00	M. Bois (35)	15,00	M. Jullien (13)	15,00
M. Gallet (38)	15,00	M. Dumarquez (62)	15,00	M. Carlué (13)	15,00
Mlle Carré (69)	15,00	M. Martinez (16)	15,00	M. Ligot (22)	15,00
Mme Menut (69)	15,00	Mme Lauret (92)	15,00	Sro Gucz (Pologne)	15,00
Mlle Raulet (44)	15,00	M. Guyon (92)	**15,00**	Sro Schrapp (All. Féd.)	15,00
M. Villégier (73)	15,00	Esp.-Grupo St-Etienne (42)	15,00	M. Friedlander (92)	15,00
M. Diard (49)	15,00	M. Truc (65)	15,00	M. Laurent (16)	15,00
Mlle Bonnafous (13)	15,00	Mme Fraccioli (13)	15,00	Mme Reyneau (49)	15,00
M. Santamaria (13)	15,00	M. Gente (84)	15,00	M. Benistant (72)	15,00
M. Berthod (06)	15,00	M. Motto (30)	15,00	Retraités enseig (72)	15,00
M. Trépied (74)	15,00	M. Got (05)	15,00	M. Lacroix (72)	15,00
Mme Quilland (44)	15,00	M. Fafournoux (69)	15,00	M. Contard (62)	15,00
Mlle Blanc (58)	15,00	M. Cavelan (06)	20,00	Mme Pellerin (49)	15,00
Mlles Kraemer (68)	15,00	M. Thierrat (75)	15,00	M. Robert (33)	15,00
M. Kraemer (78)	15,00	Mlle Benoit (38)	15,00	Mme Guillot (74)	45,00
M. Debertonne (78)	15,00	Mme Pallard (72)	15,00	M. Brousse (75)	15,00
Dr Boulogne (36)	15,00	M. Labit (71)	15,00	Sro Gelencser (Hongrie)	15,00
Mlle Minault (79)	15,00	Sro Steendahl (Danemark)	15,00	Sro Hibon (92)	15,00
M. Rohrbach (Suisse)	15,00	Sro Rasmussen (Danemark)	15,00	Mlle Dardarin (79)	15,00
M. Fourcade (45)	15,00	Mlle Lemonnier (92)	20,00	M. Guillon (45)	15,00
Sro Slot (Pays-Bas)	15,00	Sro Smith (GrandeBretagne)	15,00	M. Eyssautier (69)	15,00
Sro Ranley (Grande-Bretagne)	20,00	M. Tailpied (14)	15,00	M. Mathé (86)	15,00
M. Guillou (22)	20,00	M. Fort (10)	15,00	M. Cheverry (49)	15,00
M. Philippe (62)	15,00	M. Gimbert (19)	15,00	M. Rouquet (78)	20,00
Mlle Texier (44)	15,00	M. Béliard (44)	15,00	Mme Lucas (76)	15,00
M. Marbœuf (49)	15,00	Mlle Robin (92)	15,00	Mme Valantin (18)	15,00
M. Martin (35)	15,00	M. Bourry (18)	15,00		
Mlle Laporte (25)	15,00	Mme Claitte (69)	15,00	**Total**	**1.785,00**

LA REVUE

Nous avons attendu ce numéro pour signaler les oublis de règlement de l'abonnement 1972 par un cachet spécial sur la bande. Vous nous rendriez service en vous mettant à jour ou, le cas échéant, en nous signalant que vous ne désirez pas vous réabonner. Si vous avez réglé entre le moment où cette note est rédigée et celui où vous recevrez votre revue ne tenez pas compte du rappel et veuillez nous excuser.

NOS JOIES

Chez nos amis Lloancy, de Sfax, est né un petit David. Bienvenue et tous nos vœux au petit frère de Marina et nos bien amicales félicitations aux parents.

***

Nous apprenons avec joie que nos amis Rabin, de Baugé, sont à nouveau d'heureux grands-parents.

NOS PEINES

M. Jules Albault, père du président de U.F.E., est décédé en mars. Que le docteur Albault et sa famille trouvent ici le témoignage de toute notre sympathie.

ASSEMBLÉE GÉNÉRALE DU 25 MARS 1973

M. Cheverry est élu président de séance à l'unanimité des présents, et F. Mathé est désigné secrétaire de séance.

Présents : MM. et Mmes Babin, Berthelot, Philippeau, Méthivier, Cheverry, Dairon, Jelenc, Benistant, Bodereau, Micard, Guillot, Prévot, Boyer, Ligot, Mathé, Pallard, Coussé, Friedlander, Jacquesson, Levrard.

Sur 356 sociétaires, 226 sont présents ou représentés. Le quorum étant largement atteint, M. Cheverry déclare la séance ouverte à 10 h. 15 et donne immédiatement la parole à M. Babin, président de la M.C.E. pour l'étude de l'ordre du jour.

M. Babin présente les excuses des membres du C.A. et des conseillers techniques suivants : Mmes et MM. Guillaume, Bénazet, P. Guillot, Thierry, Vazon. Il fait part à l'Assemblée générale du retour d'une vingtaine de convocations.

I. — COMPTE D'EXPLOITATION

— L'étude du Compte d'Exploitation fait l'objet de quelques remarques : la fonction intendance d'une part (recettes 136.858,73 F., dépenses 89.089,09 F.) et les activités culturelles d'autre part (recettes 25.829,86 F., dépenses 12.345,50 F.) figurent au même chapitre.

— De la discussion du Compte d'Exploitation, il ressort que la situation n'est pas déficitaire.

Le Compte d'Exploitation est adopté à l'unanimité moins une voix contre.

II. — BILAN DE L'EXERCICE 1972

— Discussion de l'exercice au 31-12-72.

— M. Babin rend compte de la situation financière au 23-3-73 après paiement de nouvelles factures :

Actif : Disponibilités : Caisse : 2.228,86 ; C.C.P. M.C.E. : 19.141,17 ; B.N.P. : 13.423 ; C.C.P. Sablé : 1.149,53 ; C. Ep : 1.062,41.

En ajoutant les investissements (matériel de cuisine courant, installation de chambres nouvelles, travaux d'écoulement des eaux), l'actif s'élève à 13.884,13 F.

Passif : On remarque une augmentation des actions de 14.200 F.

III. — CAPITAL SOCIAL

— **Nombre de sociétaires :** M. Babin donne lecture de la liste des 20 nouveaux sociétaires acquérant 119 parts pour un capital de 11.900 F. souscrit en 1972. Il rend compte du départ de 2 sociétaires et du remboursement de 40 parts.

Le nombre des sociétaires est ainsi porté à 356.

— **Amortissement de la dette à court terme :** L'Assemblée générale refuse à l'unanimité tout nouveau prêt pour l'instant. Elle souhaite de plus le remboursement des prêts en cours dans une limite de 5.000 F.

IV. — RESOLUTIONS DIVERSES

— Actionnaires décédés, disparus, ou non représentés : l'Assemblée générale décide que sera envoyée pour l'Assemblée générale de 1974 à tous les actionnaires qui n'ont pas répondu aux convocations aux Assemblées générales des 5 dernières années, une lettre recommandée avec accusé de réception. Les décisions seront prises selon les réponses à l'Assemblée générale de 1974.

— Désignation des commissaires aux comptes pour l'exercice 1973 : MM. Berthelot et Prévot sont reconduits à l'unanimité dans leurs fonctions.

V. — RAPPORT D'ACTIVITES 1972

Adopté à l'unanimité moins une voix contre.

VI. — MISE AU POINT DES STAGES

M. Babin apporte les précisions suivantes en ce qui concerne les stages de 1973 :

Pâques. — 11-18 avril : J.E.F.O. sous l'égide de U.F.E. Administration : M. et Mme Babin ; organisation culturelle : J.E.F.O. Au 25-3, la M.C.E. n'a aucune nouvelle sur le nombre des participants.

18-25 avril : Administration : M. et Mme Jelenc ; Cours : M. Ribot. Environ 20 personnes sont actuellement inscrites.

6 Mai. — Congrès fédéral. Le matin, au château de Grésillon ; l'après-midi, à Baugé : exposition sur le Japon, représentation théâtrale. Le programme sera précisé ultérieurement.

Pentecôte. — Rencontre franco-allemande des Universités Populaires ou, à défaut, journées de travail.

20-23 Mai. — Stage Delaire.

Divers passages au cours du mois de juin.

ÉTÉ :

1er-**22 juillet.** — Administration : M. et Mme Babin. Cours : 1er degré : Dominique Babin ; 2e degré : M. Lemagadur ; 3e degré : M. Babin.

Activités annexes : E.-L. Mathé, reliure ; P. Babin, émaux.

22 juillet - 5 août. — Administration : J.-P. et J. Guillot. Le programme des conférences sera précisé ultérieurement.

6 - 26 août. — Administration : M. et Mme Ciret et M. et Mme Bodereau. Cours, Mlle E. Lemagadur, M. A. Ribot.

26 août - 9 septembre. — Administration : M. et Mme Ciret. Cours, M. Bénistant.

24 - 25 septembre. — Le comité de jumelage de Baugé reçoit des Ecossais.

VII. — QUESTIONS DIVERSES

— C.C.P. Sablé : l'Assemblée générale décide la suppression de ce compte.

— Activité 1974 : M. Jelenc et J.-P. Guillot soulèvent la question de l'organisation d'un symposium scientifique.

— Travaux en cours : M. Babin rend compte à l'Assemblée générale des transformations, au deuxième étage du château, de dortoirs en chambres familiales, de l'aménagement, au 1er étage, de nouveaux W.C. Le coût total de ces divers travaux s'élève à environ 20.000 F.

— Travaux envisagés : l'Assemblée générale autorise le Conseil d'administration à entreprendre les travaux suivants :

- cuisine : soutènement de la poutre centrale ;
- filtre à eau : analyse approfondie du fer total au départ et à l'arrivée d'eau avant d'engager des frais ;
- réédition des publications suivantes : « Gaja kantaro », les vignettes de Grésillon, Generalaj Informoj.
- Expérience de nouvelles fiches de stage.
- Salle de conférence : l'Assemblée générale donne son accord pour le commencement des travaux.

L'ordre du jour étant épuisé, M. Cheverry lève la séance à 17 h. 30.

Le secrétaire de séance :
Florent MATHÉ.

POUR VOS COURS DE PERFECTIONNEMENT

Le livre qu'il vous faut :

POR LA PRAKTIKANTOJ

de **P. Babin**

Prix : **8,50 F.**

NOS COURS PAR CORRESPONDANCE

Cours 1er degré. — 16 livrets illustrés qui permettent d'acquérir les bases essentielles de la langue. Cours et corrections : 50,00 F.

Cours 2e degré. — 14 leçons présentées sous forme de feuillets. Permet d'acquérir une connaissance pratique de la langue. Cours et corrections : 50,00 F.

Cours 3e degré. — Excellent entraînement à un cours supérieur : versions, thèmes, étude de textes. Cours et corrections : 30,00 F. Nous pouvons fournir les livres de cours à ceux qui ne les possèdent pas déjà.

VOUS POUVEZ COMMANDER

Vos livres d'étude

Vos dictionnaires

Vos livres de littérature, poésie, théâtre, histoire, géographie, sciences, à notre Service Librairie

à M. CIRET
route de la Boulerie
VIEIL-BAUGÉ - 49150 BAUGÉ

Etablir les chèques de paiement à :

MAISON CULTURELLE ESPERANTISTE
C.C.P. Nantes 1485-39

Prix franco au-dessus de 10 Fr.

Demandez notre catalogue

NOUS TENONS EGALEMENT A VOTRE DISPOSITION :

Cartes postales de Grésillon :	
noires :	0,50 F.
couleur :	0,60 F.
Cuillères de collection :	9,00 et 12,00 F.
Pendentifs :	7,00 F.
Disques de stationnement :	3,00 F.
Etoiles pour vitres de voitures :	1,00 F.

et :

Les Héros Existentialistes

(texte français-esperanto)

de Colette Llech-Walter : 3,00 F.

(plus frais d'envoi pour commande au-dessous de 10,00 F.).